# SVISA ESPERANTO - SOCIETO


## INFORMAS

N-ro 6/1995 NOVEMBRO-DECEMBRO

**L SP R NTO KOM N MO**

***Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.***

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:




**La kontaktoj...**
La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

**La eldonaĵoj...**
La plej kompleta Esperanta libroservo regalos vin per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

**La kunlaboro...**
La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado.
Jen ĉio por efike aktivi, inkluzive optimismon!

*Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.*

Sendu viajn kompletajn nomon kaj adreson, profesion kaj naskiĝdaton kun via kotizo (vd. kotiztabelon sube) al via landa peranto:

Sonja Brun, Waldeggstr.28, 6343 Rotkreuz

La konformajn prezojn rigardu en la UEA-Jarlibro 1995, sur paĝo 30.

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En Altersheim Neubad, Holeestrasse 219.
23.11.20.00h Monata kunveno: S-ro Claude Gacond iniciatos al mini-agado pere de la aperonta MINIGRAMATIKO:
7.12.95: Zamenhofa festo en Francio.

BELLINZONA:
Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32.
11.11.17.00h kaj 9.12.17.00h

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO,Spitalgasse 37.
7.11.19.30h kaj 5.12.1930h.

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
Ĉiun vendredon 18.00-19.00h

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**
En Institut National Genevois.
10.11.19.00h Monata Kunveno.
8.12.19.00h Monata Kunveno.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**
8.11.14.00-16.00h paroliga kunveno en Big Ben. Gvidos Franz Brügger.
23.11.20.00h Monata Kunveno en restoracio SIMPLON. Andy Künzli parolos pri: HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN LUCERNO.
13.12.14.00-16.00h paroliga kunveno en BIG Ben. Gvidos Franz Brügger.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Untere Bahn-

hofstrasse 18.
8.11.20.00h Monata Kunveno. Temo elektota.
14.12.20.00h Zamenhofa festo.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
13.11.19.15h Monata Kunveno en Karl der Grosse. Okazos lumbildprelego.
27.11.19.15h Libera Kunveno ĉe familio Weidmann, Eisengasse 22.
11.12.19.15h Zamenhofa festo en Karl der Grosse. Amuza programo kun muziko, kafo, teo kaj kuko.

Ni deziras al ĉiuj geamikoj solenan Kristnaskon kaj ĉion bonan por la nova jaro 1996.

ESZ KAJ LA REDAKCIO
DE SES INFORMAS

oo0oo

**S E R Ĉ A T A   E S T A S ...**

Familia rondo estas serĉata de samideanoj Dieter kaj Ciril (patro kaj filo 6-jara) por praktiki nian lingvon, ĉiun unuan kaj 3-an dimanĉon monate. Adreso:

Dieter Rooke
Aeussere Klus 2
4702 Oensingen

oo0oo

**DONACOJ AL SES KAJ AGADO 2003**

En la unuaj sep monatoj de 1995 SES ricevis la jenajn donacojn:

**POR SES:** (konto 33)
W. Schaufelberger 15.- , W. Laederach 20.- , H. Reymond 25.- , A. Kessler 5.- , F.Müller 10.- , A. Veith 15.- , A. Koller 15.- , W. Kobelt 15.- , E. Lauper 20.- , L. Schaerer 15.- , L. Dovat 15.- F. Liechti 15.- ,H. Renard 15.- , E. Walder 15.- , P. Dorthe 15.-, J. Mamin 35.- , L. Schaerer 50.- , A. Blanc 5.- , B. Spalinger 15.- , D. Lambercy 15.-

**POR AGADO 2003:** (konto 34)

A. Veith 30.- , L. Schaerer 20.- , S. Pochanke 60.- , E. Lauper 50.-

SES tutkore dankas al ĉiuj, por la valoraj kontribuoj.

-La kasisto-

oo0oo

**KORESPOND-PETO**

Karaj geamikoj, mi kuraĝas skribi al vi, uzante la internacian lingvon Esperanto. Mi multe deziras plibonigi mian Esperanton kaj, se Dio volas, krei esperantoklubon en mia lando. Mi deziras la jarlibron 1995 kaj "dictionnaire français-esperanto", kaj mi tuj ekas koni kaj uzi la esperantan lingvon. Tial pardonu al mi miajn erarojn. Mi volegas scii Esperanton kaj transdoni ĝin multe,kaj farigi samideanojn multajn. Dankon al ĉiu skribonto.

Via afrika amiko
Alassane Wedraogo
Dit apache
Kossovka-Kolongo-Macina
Mali-respubliko

oo0oo

**N E K R O L O G O:**

Aldonante al la mortanonco de Paul Bächli, en SES INFORMAS 3/95, mi aperigas koncizan priskribon pri liaj aktivecoj.

Paul Bächli naskiĝis la 30-an de junio 1901 kaj forpasis la 10-an de marto 1995. Do en siaj 94 vivojaroj li multe faris:

- Post la porinstruista lernejo kaj la gimnazio li laboris ses jarojn kiel instruisto kaj poste transiris al la industrio, kie li okupis diversajn komercistajn postenojn,
- estis ankaŭ aviadila ĉefleŭtenanto en la Svisa armeo.
- Kiel bonega konanto de la latina lingvo li lernis Esperanton en la memstudado,en la jaro 1960.
- En la Svisa Esperanto-Movado Paul Bächli
- aktivis:
- de 1960 ĝis 1977, instruante Esperanton en la komerca lernejo en Wohlen/AG,
- kiel asesoro kaj kasisto de SES 1978,
- kiel kunredaktoro de la Svisa Esperanto-Revuo, 1973-1976 kaj 1978-1979.
- li prizorgis la dokumentan servon de SES,
- li redaktis du germanlingvajn propagandobroŝurojn por SES, "Was ist Esperanto" ? kaj "die zweite Sprache für alle",
- kunlaborado en la komitato de la Eŭropa Ferio-Semajno/EFS, organizitaj de SAEF, kie li gvidis Esperantokursojn kaj aranĝis vesperajn prezentadojn 1970-1977,
- li estis elektita HONORA MEMBRO de SES,
- por UEA li estis fakdelegito en Ennetbaden/AG, pri asekurado,
- Paul ofte prelegis kaj verkis artikolojn pri Esperanto.

Vere, laborriĉa vivo finiĝis post 94 jaroj. Koran dankon, Paul pro via grandanima kaj multflanka agado.

-AK, EG, FL-

# AGADO 2003

Alvenis la momento reparoli pri la **Agado 2003**, kiun ni lanĉis en 1993. Kiel vi scias, la kontribuaĵoj alvenintaj dum la pasintaj jaroj ekformas fonduson, kies celo estas la pretigo de la festado de la centjara jubileo de SES, kiu estis definitive fondita en 1903.

## Raportindaj historiaj faktoj

La saman jaron 1903 la liceanoj Hector Hodler kaj Edmond Privat eklernis esperanton. Tre rapide ilia pionira aktiveco per la organo **La Juna Esperantisto** vastiĝis al la tuta mondo kaj fariĝis la fundamento de vera kultura metamorfozo de la esperanto-movado. La organizo de la 2-a Universala Kongreso en 1906 kaj la fondo de UEA en 1908 ĉesigis la prilingvajn diskutojn profite al ekuzo de la Lingvo Internacia por vasta gamo da tutmondaj entreprenoj.

Kaj René de Saussure, la frato de la lingvisto Ferdinand de Saussure, unu el la unuaj prezidantoj de SES, per siaj eseoj pri la vort-farado de esperanto, alportis ekde 1910 decidigan kontribuon favore al la defendo de esperanto kontraŭ la erarigaj vid-punktoj de Louis Couturat. Li estas unu el la pioniroj de la interlingvistiko. Pri ĉio tio multo estas raportinda ne nur por la esperantistoj.

## Materialo por kontakti la publikon

Ni pretigas materialon, kiu ebligos vendi esperanton surstrate pere de mini-libroj: mini-gramatiko, mini-leksikono, mini-biblioteko, ktp. Sub la nomo **Pro Esperanto** tiuj orkestritaj surstrataj vend-agadoj de mini-libroj kaj de kasedoj celos la kontaktadon de kiel eble plej vasta publiko.

Kaj paralele en nacilinvaj fakaj revuoj ni publikigos historiajn raportojn pri la pli ol centjara disvolviĝo de esperanto en Svislando kaj eseojn pri la kulturaj atingoj de la Verda Mondo. Sed ĉion tion ni povos realigi, nur se ni disponos pri la necesaj financaj rimedoj. Tial ni vigle alvokas ĉiujn SES-anojn ne forĵeti la mon-pagilon, kiu akompanas tiun ĉi numeron de "SES Informas", sed kontraŭe alporti viglan apogon per malavara kontribuaĵo. Viaj donacoj kreskigu la kapitalon de la "Agado 2003".

## Kreo de labor-grupoj

Jam okaze de la venonta Ĝenerala Asembleo de SES en 1996 ni esperas povi ekspozicii la plej maturajn projektojn de la antaŭvidita agado. Kaj tiam povos kreiĝi nacilinvaj labor-grupoj por la traduko de tiu materialo en la tri ĉefajn lingvojn de Svislando, kaj eĉ, se tio eblos, en la romanĉan almenaŭ por kelkaj dokumentoj.

Ni esperegas, ke al nia hodiaŭa alvoko multaj pozitive reagos. Antaŭdankeme via

Claude GACOND

**INTERNACIA FESTIVALO**

la jarfina aranĝo por vi **12-a**

IF

**27 dec 1995 – 3 jan 1996**

## *por personoj 25–55 jaraĝaj kaj junaj familioj*

## ROTENBURG (Germanio)

(inter Bremen kaj Hamburg)

Internacia Festivalo prezentas specifan programon por la "dua generacio" (mezaĝuloj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ gejunuloj estas bonvenaj. IF okazas sub profesinivela gvido kun internacia teamo. Bonvolu atenti, ke IS, junulara aranĝo de GEJ, okazas samtempe, sed ne samloke.

Ni elektis agrablan klerigejon en norda Germanio, en trankvila regiono periferie de urbo, tamen la centro estas en distanco de nur 2 km - vi havos 20-minutan promenon kaj konatiĝos kun ĉarma kaj tipe nordgermana urbo kun 20 mil enloĝantoj. La ejo disponas pri unu-, du- kaj kvarlitaj ĉambroj. Unulitaj ĉambroj nur por tuttempa partopreno.

Rotenburg (Wümme) estas bone atingebla aŭtostrate kaj fervoje. En la urbo estas trajnstacio, internacilinie vi ŝanĝu en Bremen aŭ en Hamburg; alventage ni aranĝos "transportan servon". Distancoj al aŭtostratoj Bremen/Hamburg, Hannover/Bremen 20 km; al urboj: Bremen 45 km, Hamburg 75 km. -HDP-

**PS:** Kompleta programo kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS, Wiesliacher 17, 8053 Zürich. -FL-

# K.C.E. ree viglas

Ekde la komenco de la jaro 1995, sub la prezido de Giorgio Silfer, Kultura Centro Esperantista ree altiras la studemulojn. Ĉar ne ĉiuj SES-anoj ricevas la monatan cirkuleron "**Ĉe la domparo**", kiu raportas pri tiu kultura agado kaj anoncas la venontajn renkontiĝojn, ni opinias, ke alvenis la momento atentigi ĉiujn legantojn de "SES Informas" pri tiuj aranĝoj.

La septembra monata cirkulero anoncis la programon por tuta jaro, do ĝis la fino de aŭgusto 1996. Jen la listo de venontaj kulturaj monatfinoj: Oktobro 21-22, prelegos la bulgaro Kiril Velkov. Novembro 25-26. Decembro 28 ĝis Januaro 3 okazos Jarfino ĉe la Domparo. Nia SES-prezidantino Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer matene kaj vespere gvidos vin al la legado de la esperanto-libroj necesaj por trapasi la skriban parton de la FEI-ekzameno **Atesto pri Lingva Kapableco**. Kaj Marco Picasso kaj Jacqueline Poux gvidos vin en skipromenadoj kaj, se vi havos intereson, al promenado tra la alfabetoj de la mondo.

La sekvaj kulturaj monatfinoj estos: Januaro 27-28; Februaro 24-25; Marto 23-24; Aprilo 27-28, Majo 25-27: Granda pentekosta renkontiĝo; Junio 29-30. Ekde la mezo de julio ĝis la mezo de aŭgusto okazos kursprogramo, kiun ni anoncos en venonta numero de "SES Informas".

Ni instigas la esperanto-grupojn listigi unu aŭ eĉ plurajn el la ĵus menciitaj aranĝoj en sian programon, por karavane partopreni ilin. Kaj ĉiu individue notu la anoncitajn datojn en sian kalendaron.

Claude Gacond, la rakled- kaj fondu-pretiganto

## ESPERANTO-LIGO DE OKCIDENTA AŬSTRALIO


(de Idyss Einihovici)

Mia vivedukiĝo komenciĝis dum la skolta ĵamboreo, kie mi starigis esperantan budon, la 28-an de decembro 1994 ĝis la 10-a de januaro 1995. Mi deĵoris de 09.00-17.00h.
Partoprenis 13000 skoltoj. La plimulto estis angle parolantoj. Ili aspektis feliĉaj, sed la skoltoj el aliaj landoj estis malĝojaj, ĉar ili ne kapablis komunikiĝi.
Dum mia deĵorado la tutan tagon mi konversaciis kun skoltoj kaj gvidis klason. La 9-10-jaraĝuloj entuziasme studis Esperanton kaj laŭdis la lingvon. Kiam mi menciis:
-ke en la mondo estas 3000 lingvoj,
-ke bonŝance inter ili troviĝas unu lingvo speciale kreita de la geniulo d-ro Ludoviko Zamenhof, Esperanto, kaj
-ke ĝi estas facile lernebla kaj povas anstataŭi 3000 lingvojn,
-ili instinkte kaj entuziasme ekkriis: "ĝi estas **magia lingvo**"!!

Mi ekĝuis aŭdi la vorton "magia", ĉar mi neniam aŭdis tiun esprimon rilate al Esperanto. Laŭ mia opinio la skolta movado estas la plej fertila grundo por propagandi Esperanton.
Dum mia longa (56-jara) Esperantisteco mi ne uzis la vorton magia. Estas la infaninstinkto, kiu edukis min kaj mi estas ĝoja.
Nia estonta generacio kuŝas en la edukado de la monda lingvo Esperanto, kaj ĝi devas esti nia fokuso. Esperanto estas lingvo belsona kaj facile lernebla. Ni reklamu prestiĝan Esperanton. Senlace, senĉese kaj daŭre ĝi estu nia espero.
En mia aĝo de 92 jaroj la kontakto kun skoltoj estas mia valorega edukado. Kunvivu mian dinamikan sperton kun skoltoj kaj ni iru avangarde sukcesplene.

-Via Idyss Einihovici-

# I N T E R N A C I A   K U N L A B O R O



Tri ŝtatestroj celebras la malfermon de la ponto de amikeco. De maldekstre: S-roj: Chuan (Tajlando), Keating (Aŭstralio), Khamtay (Laoso).

## PONTO DE AMIKECO

En aprilo, antaŭ homamasoj de centmiloj, ĉefministro de Aŭstralio, Paul Keating (Kiteng), inaŭguris la unuan ponton trans la rivero Mekong inter Laoso kaj Tajlando, unu el la plej grandaj riveroj de la mondo. Keating diris, ke la ponto -kies koston kovris Aŭstralio- estas simbolo de amikeco inter Aŭstralio kaj la ĉebordaj landoj.
La "Ponto de Amikeco" estas grava paŝo en la evoluo de la baseno Mekongo. La anstataŭigo de malrapidaj prametoj per moderna aŭtovojo plifaciligas komercon kaj turismon inter Laoso kaj Tajlando kaj ebligos eĉ pli da kunlaborado en la valo de la rivero. Planitaj estas ekzemple digoj kaj elektrocentraloj. La ponto estas 1300 metrojn longa kaj la planado kaj konstruado okupis 6 jarojn. Ĝi kostis ĉ. 30 Milionojn da usonaj dolaroj. 15 aŭstralianoj kaj 300 metiistoj de Laoso kaj Tajlando konstruis la ponton. Ĉar en Tajlando oni veturas voj-maldekstre,kaj dekstre en Laoso, oni devis provizi interŝanĝan sistemon por aŭtomobiloj. -Ralph Harry-

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

**81-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO PRAGO**

(ĉeĥa Respubliko), **20-a-27-a de julio 1996.**

Jen el la unua bulteno:

Sepdek kvin jarojn post la unua Universala Kongreso en Prago (la 13-a UK en 1921, kun 2561 partoprenantoj) la plej granda Manifestacio de la tutmonda Esperanto-Movado venas al unu el la plej fascinaj urboj de Eŭropo. Prago verdire ne bezonas reklamadon, ĉar ĝi nun denove estas unu el la fokusoj de la eŭropa turismo.Iasence ankaŭ nia kongreso ne bezonas reklamadon,ĉar ĝi tradicie arigas pli da partoprenantoj ol ĉiuj aliaj internaciaj movadaj aranĝoj kune. Ni krome estas bonŝancaj, ke la fino de julio ne estas en Prago turisma ĉefsezono, tiel ke ni ĝuos ne nur trankvilan sed ankaŭ forte rabatitajn prezojn en la unike bela metropolo de la ĉeĥa Respubliko.

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 1/96 estas la 6-a de decembro 1995.**